




tejo tutmonde

tutmonda esperantista junulara organizo



**Pri la unua
JES en
Pollando**

**TEJO-
estraranoj
respondas**

**Esperanto-
futbalteamo
en Afriko**



diskonigi agadojn kiuj ankoraŭ ne plenumiĝis, sed oni ja laboras tiucele.

Aperas ankaŭ du kontribuajoj el ekstereŭropa movado, kaj mi konfesu ke mi ŝatus aperi pli da tiaj artikoloj. Pro tio mi kore invitas ĉefe la ekstereŭropajn aktivulojn kontribui en la venontaj numeroj!

bonan legadon!
Nicola

*Karegaj legantoj,
en tiu ĉi numero
por vi TEJO-
Tutmonde
intervjuis la
estraranojn de
nia organizo: jen
por klarigi al
averaĝa membro
la estraran
taskaron jen por*

Enhavo

Pli ol 200 gejunuloj en
Zakopane.....3
Karavan' sen fin'.....4

Intervjuo kun
Gregor Hinker.....7
Saša Kovyazina.....8
Paulína Kožuchová.....10
Irmina Szustak.....11
Sergeo Tyrin.....13
Łukasz Żebrowski.....15

IJK 2011 en Ukrainio.....12
Brazila Ministerio pri Edukado
kaj Esperanto.....17
Esperanto-futbalteamo en
Afriko.....19
Fotokonkurso de PEJ.....20

TEJO Tutmonde estas dumonata oficiala gazeto de TEJO pri la junulara Esperanto-movado. Ĝin ricevas ĉiuj individuaj membroj kaj patronoj de TEJO. Landaj junularaj Esperanto-organizoj povas ricevi ĝin.

Kontribuojn sendu rete al tejo-tutmonde@tejo.org (per normala mesaĝo aŭ kiel kunsendita tekst-dosiero), aŭ paperpoŝte al la adreso: TEJO Tutmonde (Nicola RUGGIERO), Bræðraborgarstígur 55, 101 Reykjavík, Islando. Fotojn/bildojn sendu kiel JPEG. **Viaj kontribuajoj estas bonvenegaj kaj necesaj!**

Aliaj Esperanto-gazetoj rajtas republikigi artikolojn el TEJO Tutmonde kondiĉe ke ili mencias la fonton.

Redaktisto: **Nicola RUGGIERO** (Islando). Demandojn pri membrecoj, abonoj, distribuo ktp. sendu al: TEJO, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando; rete: oficejo@tejo.org. Presado: SKONPRES, Bydgoszcz, Polujo; rete: skonpres@poczta.onet.pl. **La redaktisto kaj la eldonanto ne respondecas pri la opinioj de unuopaj aŭtoroj.**



ĜD Edukado kaj kulturo

Programo "Junularo en Agado"

Tiu ĉi eldono estas financita kun subteno de la Eŭropa Komisiono. La publikaĵo tamen nur reflektas la vidpunkton de la unuopaj aŭtoroj, kaj la Eŭropa Komisiono neniel respondecas pri ajna uzo de la informoj.

Pli ol 200 gejunuloj en Zakopane

de *Małgorzata Baczyńska, Irek Bobrzak, Arek Zychewicz*

Fine de la pasinta jaro, inter la 26.12.2009 kaj 3.1.2010, en la montara urbo Zakopane, Pollando, okazis la unua Junulara E-Semajno, kuna iniciato de Varsovia Vento, GEJ kaj PEJ. Malgraŭ la fakto, ke JES en la aranĝa kalendaro aperis ĵus la unuan fojon, ĝi sukcesis kolekti pli ol 200 partoprenantojn el la malnova kontinento kaj el kelkaj ekstereŭropaj landoj. La interesiĝo pri la evento venis pro unuiĝo de la Ago-Semajno (AS) kaj la Internacia Seminario (IS). Dum la 10-a MIRO en Kroatio la organizantoj de ili interkonsentis respondi al deziroj de siaj partoprenantoj kaj el la du plej grandaj kaj popularaj vintre junularaj eventoj krei nur unu. La reago de la esperantista junularo estis antaŭvidebla. Preskaŭ ĉiuj entuziasme kaj unuvoĉe ekkriis: JES!

Ekde komenco konsistanta el poŭoj kaj germanoj, la organiza teamo ŝatis krei aranĝon tute novan ne nur je nomo. Ĝisnuna skemo de AS- kaj IS-spertoj miksiĝis por atingi iel freŝan kaj eksterordinaran rezulton. Por krei neforgeseblan etoson estis luita nur unu ejo, en kiu ĉiuj povis esti kune. Tute



ne kutime prezentiĝis ankaŭ la programo, ekskursoj – la busoj estis ne unu sed tri, eĉ la manĝo-tempoj sekvis en ne kutimaj, ĝis nun, horoj. Kompreneble ne ĉiuj akceptis la ŝanĝojn entuziasme. Tamen, spite al ia malkomforto loĝi en grandaj ĉambroj, plej multaj en la nova realeco trovis sin kvazaŭ fiŝoj en la akvo. La kuneco tuj vekis eksterordinare bonegan etoson, kiu respegulis la plej bonajn impresojn de la koridora ludo dum iu ajn esperantista aranĝo. Fakte JES estis absolute koridora. Malgraŭ apartaj ejoj por la programeroj la festo daŭris ekde komenco ĝis la fino en ampleksaj koridoroj de la ejo, kiuj transformiĝis en kafejojn, kunajn kantejojn, dancejojn, eĉ oficialajn kaj neoficialajn koncertlokojn.

Ankaŭ programe la nova aranĝo evidentiĝis impone sukcesa. Dume prezentis sin muzike (oficiale kaj neoficiale) Ĵomart kaj Nataŝa kun Karina, Georgo Handzlik, Kim J. Henriksen (Hotel Desperado), Pafklik - Platano kun Emĉjo, Éric Languillat, Gijom Armide kaj Johannes Müller. Neoficiale, pri kio vere indas mencii, koncertis ankaŭ Tifen el Francio kaj Aleksandr Hrustalov kun Tanjo. JES eniris la historion ankaŭ kiel aranĝo kun teatra aktiveco. Apud spektakloj de la E-Studio "Improviso", kiu prezentis elektitajn dramojn de la fama rusa verkisto Anton Ĉeĥov, sursceneje ludis rolon de Doktoro Esperanto Georgo Handzlik, impresdonan inscenigon proponis ankaŭ la junularo de la moskva klubo EkMasi. Kompreneble en la

programo ne mankis prelegoj pri diversaj temoj kaj prezentoj de la esperantistaj eventoj. Krome, apud la ekskursoj en la urbon kaj en proksiman ja belegan Tatan montaron, estis organizitaj diversformaj trejnadaj. Inter ili valoras mencii pri lernado de la pentrado kaj skulptado en la loka arta lernejo kaj trejnadado de ĵurnalismo por la redakcio de la podkasta radio Varsovia Vento-Elsendoj.

interkonsento de la pola kaj germana junularoj la dua JES okazos en Germanio. En momento, en kiu vi legas la artikolon, la teamo probable elektis jam lokon de la dua renkontiĝo kaj kune, pro la internacieco pere de la retaj rimedoj, komencas prepari la aranĝon. Pli multe da informoj vi trovos ĉe la paĝo de JES, www.jes.pej.pl, en kiu vi trovos ankaŭ la retan aliĝilon.

La unua ne signifas la lastan. Laŭ

Bonvenon al la dua JES!

Karavan' sen fin'

de Aleks Baudry

Ja esperantaj renkontiĝoj estas agrablaj. Ja estas agrable plilongigi la renkontiĝon antaŭe kaj poste partoprenante en bonetosa karavano. Ja iĝas freneza (ambaŭsence) se la karavano malfruas...

Ĝi okazis al la dua karavano revenante de JES, kiu okazis en Zakopane je tiu lasta novjaro. La karavano celis Parizon, kiu atingiĝis kun pli ol unu tago da malfruo.

Ĝi komenciĝis bone... kaj fruege. Je la 3a nokte la grupigo de la pli ol 20 partoprenantoj estis planata, por eniri la unuan fruan trajnon, kiu foriris je la 4a 20. Post brakumado kaj ĝisado ĝi ekis, kun aliaj vojaĝantoj celante Krakovon.

Problemo aperis je kapto de la dua trajno, kiu fie ne atendis nin, kiuj alvenis nur kun 5 minutoj da malfruo! Kun ironio ni vidis ĝian pugon iri for... Tamen bonetose ni eniris kaj faris nia la stacidomon de tiu urbeto (Sucha Beskidzka), pendigante reklamafiŝon de FESTO.

Tiam okazis la plej bedaŭrinda momento de la vojaĝo. En la stacidomo estis du senhejmuloj, kiuj elektis tiun lokon por dormi. Unu el la du estis surgrunde, en tute ridinda pozicio. Iam, lia amiko vekiĝis, kaj provis veki sian kunulon.... sensukcese. Li do skuis lin pli forte kaj frapis lin survange. Ni spektis tion sen tre scii kion fari, kaj sen kompreni. Ĉiukaze, estis nenio farebla, la homo estis (eble jam delonge) mortinta, probable pro malvarmo. Tamen, partoprenanto de la karavano finfine decidis preni telefonon kaj voki sukurejon.

Krom tiu bedaŭrindega evento, la etoso de la karavano estis bona, eĉ post scio ke la venonta trajno estus nur... post ses horoj! Ni do firme hejmgis. Kelkaj dormis (laŭdire sufiĉe bone) en malhela parto de la konstruaĵo. Aliaj decidis esplori la polan ĝangalon, por trovi manĝaĵojn. Evidentiĝis, ke la stacidomo tute ne havis necesejon. Tio estas kompreneble

malgrava problemeto por viroj, kiu povis ĝui la plezuron de la urinaj desegnaĵoj surneĝen, sed ja gravega problemego por knabinoj, kiu devis ĉasi urbe la maltrinkejojn.

Post la seshora atendado, ni kun granda plezuro bonvenigis la tiom atenditan trajnon. Finfine ni povos komforte kaj varme sidi por dormi. Tiu vojaĝo daŭros sep horojn! Sep horojn da ripozo! Nia feliĉo daŭris mallonge kiam ni malkovris ke la trajno estis neimageble plenplena. Je kelkaj vagonoj, homoj kvazaŭ riskintus fali pro malfermo de pordo, aŭ eĉ malpermesis malfermon de ekstere. Kaj ni estis dudek! Mi persone pensis dum unu minuto ke oni ne povus eniri dudekope, kaj eble rezignus eniri tiun trajnon, riskante atendi eble plurajn horojn pli.

Sed mirinde ni finfine ĉiuj eniris, po kelkaj vagone. Fakte la pleno de la trajno estis tute komprenebla. Ĝi venis de Zakopane, je dimanĉo matene, tiam kiam ĉiuj feriantoj revenis de vintraj ferioj... kun grandaj pakaĵoj kaj glitmaterialoj. Ni do retrovis kelkajn ĉeestantojn de JES, kiuj ĝentile ridetis, sed certe ene ridegis pro nia

malfeliĉo!

Ni do vojaĝis malkomforte, inter pakaĵoj, kelkaj el ni eĉ plurope en la necesejoj. Iri en la trajnon estis malfacile, kaj pro la troa nombro da vojaĝantoj, sed ankaŭ pro pordo kiu misfunkciis dum plejparto de la vojaĝo. Tio estis zorginda, ĉar nur la organizanto sciis kie kaj kiam eliri de la trajno. Feliĉe iom post iom la vagonoj malpleniĝis kaj kelkaj nur post pluraj horoj povis (finfine!) eksidi.

Ni do alvenis en Wrocław, fruvespere anstataŭ tagmeze, por malkovri ke la planita trajno kiun ni devis kapti jam foriris antaŭ nia alveno, kaj ĝi estis la lasta Germanien... Feliĉege ni renkontis Russ kaj Anna, kiuj ankaŭ revenis de JES kaj loĝas en Wrocław. Ili afablege decidis gastigi la tutan grupon en ilia tute-taŭga-por-du-personoj-sed-multe-malpli-por-dudek-a loĝejo.

Oni komprenu, ke estas granda diferenco inter gastigado de unu homo kaj dudek en tia loĝejo. Estas same kiel stiri aŭton kaj stiri kvardektunan kamionon. Ni do devis unue pripensi proceduron por eniri la apartamenton.

Unue ĉiuj eniris plej supre de la ŝtuparo (eĉ se la apartamento ne estas je la lasta nivelo). Poste ĉiuj elprenis siajn ŝuojn por ne malpurigi la lokon, kaj samtempe donis siajn pakaĵojn por ke oni kunigu ilin provizore. Tiam la grupo disiĝis en du grupetojn. Unu iris en la urbon por aĉeti vesperajn manĝaĵojn, dum la alia restis en la hejmo por ordigi kaj ripozi. Ĉiuj gardis



sian bonan etoson, eĉ se normale oni devintus esti meze de Germanio, anstataŭ meze de Pollando. Tamen, lacego estis videbla survizaĝe. Kvankam estis junulargastejo proksime, nur unu (mi) decidis dormi tie. La aliaj preferis resti grupe kaj dormi surplanke, ankaŭ por ne riski maltrafon de la foriro.

Tiucele, ĉiuj vekhorloĝoj, poŝtelefonoj kaj brakhorloĝoj estis uzataj kaj agordataj por sonori je la 5a 45 matene! Ja preciza plano estis farita por ne maltrafi la trajnon je la 6a 20, kiu inkluzivis eĉ "enŝuiĝon" (ĉar unue oni devis retrovi siajn proprajn).

Dormante sole en la junulargastejo, mi prenis grandan riskon maltrafi la forveturon (des pli ĉar mi lastfoje dormis du tagojn antaŭe!), kaj tial eĉ pli fuŝus mian revenvojaĝon. Mi tamen tre bone (mallonge) dormis en la junulargastejo, imagante en kiaj pozicioj kelkaj devus dormi en la salono de Anna kaj Russ. Tutfeliĉe, mi sukcesis vekiĝi ĝustatempe por atendi la grupon ĉe la pordo je planita horo. Verŝajne la nokto pasis bone, la

vizaĝoj de miaj kunuloj ne montris la lacecon kiun mi atendis.

Ni do ekis, iom malfrue, denove dudekope kun Anna kiu timetis ke ni ne retrovus la vojon stacidomen, kaj bonorde kaptis la tiomatenditan, komfortan, ĝustatempan, germanan trajnon Dresdenen!

En Dresden, mi decidis forlasi la grupon kaj elektis la multekostan elekton. Mi do ne rajtis profiti la avantaĝojn de la germanaj grupbiletoj, kiuj ja permesas vojaĝi grupe malmultekoste, sed signifas vojaĝi nur per malrapidaj trajnoj. Mi feliĉe havis (nur!) kvin horojn da malfruo.

Mi aŭdis poste, ke la karavano finfine alvenis dudek ok horojn malfrue! Ja parte pro turismumado en Strasburgo de la grupo, kies partoprenantoj ege malmultiĝis.

Tamen ĝustatempe alvenis ĝi por kelkaj, kiuj alvenis hejmen por ekzameniĝi!

Mi varme salutas ĉiujn malfeliĉulojn kiuj spertis tiun vojaĝon, kaj esperas ke ĝi ne detenos ilin partopreni venontan renkontiĝon, eble veturante per karavano!



TEJO-Tutmonde renkontas la Estraron

Por konigi al la membraro la estrarajn aktivaĵojn kiuj ofte ne aperas al la ekstero, la redakcio decidis intervjui la estraranojn. En venontaj numeroj aperos aliaj intervjuoj kun aliaj aktivuloj de TEJO.

Gregor HINKER

Prezidanto, gregor@tejo.org



TEJO-Tutmonde: Saluton Gregor, vi estas prezidanto de TEJO.

Bonvolu rakonti pri kio temas konkrete via tasko en la estraro.

Gregor HINKER: Saluton Nicola! Ene de la Estraro,

la prezidanto estas la "moderatoro": ties tasko estas kunordigi la aktivaĵojn de la aliaj estraranoj. Por la ekstero, la prezidanto estas la reprezentanto de la organizo en la "ekstera mondo" kaj ene de la movado, ekz. en rilatoj kun UEA, la Centra Oficejo, kaj aliaj Esperanto-organizoj.

TT: Kiujn aktivaĵojn vi kunordigis en la pasinta estraro, kiujn nun kaj kiujn vi kiel estraro planas?

GH: La taskoj de la estraro de TEJO estas grandparte "konstantaj" aktivaĵoj, kiel la IJK, la administrado de la organizo, kaj simile. Aldone ni sekvas projektojn: dum la pasintaj jaroj nia plej granda estis la reformo de Pasporta Servo, kiu daŭre restos ĉefa projekto. La renovigon de la grafika identeco ni finis per la enkonduko

de nova logotipo kaj de la nova membrokarto. Cetere, ni nun laboras pri refreŝigo de Kontakto, baze de la enketo kiun tiucele ni faris antaŭ monato.

TT: Kiaj estas la rilatoj kun la "ekstera mondo"? Ĉu TEJO kunlaboras kun aliaj junularaj organizoj? Se jes, kion konkrete ili faras kune?

GH: TEJO ene de la Forumo Junulara Eŭropa estas respektita kiel kompetenta pri lingvaj demandoj. En la pasinteco, ni plurfoje sukcesis organizi trejn-seminariojn kun ne-esperantistaj junularaj organizoj. Momente tiuj ne estas, kvankam ni principe strebas reokazigi tiajn. Tamen, pro evidentaj (lingvaj) obstakloj, la altaj kostoj por tradukado postulas grandan subtenon de iuj instancoj.

TT: Kiaj estas la rilatoj kun aliaj Esperanto-organizoj? Ĉu fakte okazas komunprofita laboro?

GH: Feliĉe ekzistas multaj Esperanto-organizoj kun diversaj aktivec-fokusoj. Dum la pasintaj jaroj, ni sukcese kunlaboris ekz. kun la Internacia Ligo de Esperanto-Instruistoj (ILEI), kies lingvoekzamenoj kaj trejnkursoj estas tre popularaj dum IJKoj.

TT: Ĉu TEJO plu strebas al sendependeco disde UEA? Se jes, pri kia sendependeco fakte temas?

GH: La rilato inter TEJO kaj UEA estas miaopinie sufiĉe komforta kaj avantaĝa por ambaŭ flankoj. Unuflanke, TEJO estas la junulara sekcio de UEA, kaj kiel organizo profitas de la infrastrukturo kaj

organiza administrado kiun disponigas UEA kaj la Centra Oficejo; aliflanke, TEJO lastatempe akiris juran statuson kiu permesas al ni memstare agi kiel internacia organizo kaj tiel peti kaj ricevi subvenciojn. Laŭ miaj spertoj ni fartas bone kiel parto de UEA, kaj estu fiera ke UEA kaj TEJO komune estas la plej granda kaj grava Esperanto-organizo.

Oleksandra (Saŝa) KOVYAZINA

Estrarano pri Informado, sasxa@tejo.org



TEJO-Tutmonde: Saluton Saŝa, vi estas en la TEJO-estraro unua vicprezidanto kaj estrarano pri informado.

Ĉu vi povus iom klarigi pri viaj taskoj?

Saŝa KOVYAZINA: Kiel estrarano pri informado mi respondecas pri komunikado pri agado de TEJO, pri "videbligado" de nia organizo.

Mi volas ke homoj pli sciu kio okazas en TEJO kaj TEJO-estraro, kaj por tiu ĉi celo mi volas havi pli bonan ĝisdatigadon de tejo.org, TEJO-aktuale kaj TEJO-Tutmonde, kaj pli proksiman kontakton kun la esperantaj amaskomunikiloj.

TT: Bele! Kiel?

SK: Mi ŝatus ke aperu regulaj gazetar-komunikoj kaj estu pli da amas-komunikiloj kun kiuj ni kun-laborados. Mi ŝatus ke pliaj amas-komunikiloj kaj blogemuloj ankaŭ mem ne hezitu kontakti nin. Tre gravas por mi ankaŭ la opinio de aliaj pri funkciado de TEJO. Mi ŝatus ricevi pli da retrokoplado de membroj kaj simple junuloj.

Por mi tre gravas scii kiajn rezultojn havas nia laboro. Mi vere ŝatus, se al mi venus pli da leteroj kun rimarkoj, laŭdoj kaj kritikoj.

TT: Kion vi celas per "videbligado" de TEJO?

SK: Nu, ke krom la nomo mem de la organizo homoj sciu kion ĝi signifas kaj kion faras.

TT: Kiasence vi respondecas pri informado?

SK: Mi devas esti certa, ke se aperas iu grava decido aŭ anoncinda afero, homoj estu informitaj.

TT: Ĉu vi kunordigas aŭ mem agas?

SK: Laŭ la situacio, povas fari mem aŭ taskigi iun, aŭ plejofte faras kun iu. Kelkajn mi taskigas al alia. Eble dirindas, ke mia posteno ne havis antaŭulojn kaj do la koncepto mem de la taskaro estas plu prilaborata. Laŭ mi, mi ankoraŭ ne atingis la efektivecon kiun mi ideale volus havi.

TT: Interese! Ĉu vi emus paroli pri via estrarana programo en detalo?

SK: Do, la "Informado" mem estas sufiĉe ampleksa afero. Ĝi konsistas el multaj punktoj, kiel stabila interrilato kun amaskomunikiloj, stabile ĝisdatigata retejo, ĝustatempe aperantaj oficialaj eldonoj de TEJO, ekzisto de broŝuroj, varbiloj, ĉemizoj ktp, komunikado kun/al membroj, ekzisto de retroklupado, facile atingeblaj informoj por novuloj, kaj eĉ ekzisto de komunikado ne nur esperante. Ideale estos de TEJO havi stabilan interkomunikadon kun esperantaj amaskomunikiloj kaj ĵurnalistoj. Kaj membroj ne demandu "ho, por kio TEJO utilas, krom rabato dum IJK?" Do, por ke esperantistoj kaj la novuloj, facile trovu informojn.

TT: Kie oni povas efektive trovi informojn pri TEJO kaj ties agado?

SK: Krom ĉe tejo.org, oni povas aboni

senpage al TEJO-aktuale kiu aperas dufoje monate, TEJO-Tutmonde estas oficiala eldono de TEJO kaj ankaŭ oni povas sekvi TEJO-agadojn ĉe Twitter¹, ĉe Facebook² kaj Ipernity³.

TT: Kiujn punktojn vi sukcesis atingi aŭ kiujn vi prilaboras nun por ke ili sukcesu? Ĉu vi ankaŭ laboris ekster via specifa kampo?

SK: Mi dirus, ke mi dediĉis sufiĉe multe da tempo al Pasporta Servo, sed certe, ne estas kontribuo de mi sola sed de la tuta estraro. Ankaŭ mi ŝatus mencii, ke mi tre dankas nian volontulon Aleks Baudry kiu dediĉeme kontribuis al la apero de libro: li persone kompilis ĝin. Ankaŭ mi dankas Julia Noe, nian eksvolontulon, kaj Sylvie Roques kiu laboris/as kun la landaj organizantoj.

Ĝojas mi ke ni nun havas kaj libron (kvankam ĝi neperfektas) kaj funkciantan retejon, kiu havas pli ol 1300 gastigantojn (tamen ankaŭ la retejo sendube bezonas plibonigon).

Se paroli specife pri mia kampo, mi dissendis kelkajn komunikojn, sed multaj aferoj restas efektivigendaj en mia agendo.

Notoj:

¹ www.twitter.com/tejoofficejo

² www.facebook.com/tejoofficejo

³ www.ipernity.com/home/tejo



Paulína KOŽUCHOVÁ

Ĝenerala Sekretario, paulina@tejo.org



TEJO-Tutmonde: Saluton Paulína, en TEJO-estraro vi estas la Ĝenerala Sekretario. Pri kio temas via tasko?

Paulina KOŽUCHOVÁ: La Ĝenerala Se-

kretario devas administri diversajn datumojn, gvidi elektojn kaj nomumojn de komitatanoj, kunvoki komitatkunvenojn, zorgi pri protokoloj, administri retajn diskutlistojn, parte okupiĝi pri informado (ekzemple cirkuleroj, raportoj), gvidi voĉdonojn, prepari la estraran raporton kaj entute kontroli ĉu ĉiuj agadoj ene de TEJO okazas laŭregule.

TT: Kio estas la laborplano de TEJO?

PK: Oni jam laboras por plenumi la laborplanon. Parte temas pri daŭrigo kaj plibonigo de la ĝisnuna agado, sed ankaŭ estas novaĵoj. Konkrete temas pri

organizado de IJKj (ĉijare en Kubo, venontjare en Ukrainujo), al kio aldoniĝis strategia celo organizi IJKn en Afriko, krome oni planas okazigi seminariojn, plibonigi la kampon de komunikado kaj informado, realigi la projekton pri monda kursa mapo, arkivadi, daŭrigi KODEJOn, renovigi Kontakton, vigligi na tejo.org kaj TEJO-Tutmonde, plibonigi Pasportan Servon (kaj retejon, kaj libreton).

TT: Ĉu vi plenumas TEJO-aferojn ekster via specifa kampo? Se jes, kiujn?

PK: Estas kelkaj aferoj, pri kiuj mi eĉ ne scias ĉu ili ankoraŭ apartenas al la agadkampo de Ĝenerala Sekretario aŭ ne plu. Foje mi faras taskojn kunlabore kun iu alia estrarano aŭ kun la volontulo. Krome estas aferoj kiuj estas ĝeneralaj, tut-estraraj. Sed por nomi almenaŭ iujn konkretajn ekzemplojn de mia ekstersekretaria agado: lastatempe mi verkis por subvenciraporto, aŭ antaŭe mi preparis la enketon pri Kontakto. Kaj krome estas multaj etaj aferoj, ekzemple mi ial multe provlegas.



*Tiu ĉi membrokarto povus
jam esti via.
Mojosas ĝi, mojosos vi
tejo.org/eo/membrigho*

Irmina SZUSTAK

Estrarano pri Landa Agado, irmina@tejo.org



TEJO-Tutmonde: Saluton Irmina, vi estas TEJO-estrarano pri Landa Agado. Pri kio fakte temas via tasko?

Irmina SZUSTAK: Saluton. Jes, ekde pasinta IJK en Liberec, Ĉeĥio mi respondecas pri landa agado ene de estraro de TEJO. Mia tasko estas okupiĝi pri landaj sekcioj de TEJO (nuntempe TEJO havas 45 landajn sekciojn). Mia tasko estas havi kontakton kun ili, helpi, se necesas ankaŭ kunlabori kun organizoj kiuj volus iĝi landaj sekcioj de TEJO. Unu el la celoj de ĉi estraro estas provi organizi IJKn en Afriko, starigo de la komisiono kiu esploros la eblecojn estas sur ŝultroj de estrarano pri Landa Agado.

Unu el aferoj pri kiu okupiĝas estrarano pri Landa Agado estas organizo de la konkurso Partoprenu IJKon. Fonduso "Partoprenu IJK-n" helpas al membroj de TEJO partopreni la Internacian Junularan Kongreson. Per la fonduso eblas peti monon por parte kovri vojaĝkostojn, loĝadon kaj programkotizon. Ĉi jare eblis partopreni la konkurson por vojaĝi al IJK kiu okazos en Kubo.

Alia mia respondeco kiel TEJO-estrarano pri Landa Agado estas ĉiu jare prepari la demandilon KODEJO.

TT: Kio estas KODEJO? Al kio ĝi utilas?

IS: KODEJO (Kompleta Demandaro por Esperantaj Junularaj Organizoj) estas

demandaro kiun TEJO preparis por siaj landaj sekcioj kaj aliaj junularaj organizoj. Pere de ĝi TEJO celas kolekti gravajn informojn de la junularaj organizoj de nia movado. Ĝi kolektas unue la informojn, kiuj ĉiam devas esti ĝisdataj por datumbazo de TEJO kaj por la jarlibro de UEA, kiel aktuala estraro, aktualaj kontakt-informoj, ktp. Due, ĝi provizas aliajn interesajn informojn, kiuj ebligas havi superrigardon pri la funkciado de landaj sekcioj, i.a. pri la kotiz-sistemo, pri estrarperiodo kaj la rilato kun siaj nejunularaj tegmentaj organizoj.

TT: Antaŭe vi parolis pri la fonduso "Partoprenu IJK-n". Ĉu vi povus iom detaligi pri ĝi?

IS: "Partoprenu IJK-n" estis fondita antaŭ iom da jaroj cele ebligi vojaĝon IJK-en, al aktivuloj en malbona financa situacio. La vizio estas sproni ilian agad-emon ĉar festumado en tiu ĉi plej mojosa junulara esperanto-aranĝo povas doni al ili signifan impeton daŭre aktivi por Esperanto kaj fortigi la junularajn klubojn en siaj propraj landoj. Rekompence al repago de vojaĝ-kaj loĝkostoj, la stipendiitoj ricevas taskon por plenumi dum la kongreso, kutime helpi iamaniere al la LKK – tiamaniere, ĉiuj flankoj gajnas. Malgraŭ nia emo partoprenigi ĝejnulojn el foraj landoj, foje aperas malbonŝancaj obstakloj kiel vizproblemoj: antaŭ du jaroj gajnis la konkurson knabino el Libano (kio povus esti ŝanco por Esperanto en tiu lando!), sed fine oni rifuzis al ŝi la vizon.

Bedaŭrinde, la fondaĵo ne havas proprajn monrimedojn, kaj tial povas subvencii nur malmultajn ĉiujare. Ĝia ĉefa fonto estas la IJK-licenco kies duono aŭ pli (laŭ interkonsentita politiko de la estraro) eniras la fondaĵon kaj havigas al ĝi ĉirkaŭ mil eŭrojn ĉiujare – konsekvence, donacoj al "Partoprenu IJK" estas tre bonvenaj kaj rekte bonefikos al junaj aktivuloj el la malpli pagipovaj landoj.

TT: Kiel laboras la komisionoj pri Landa Agado? Kiel laŭ vi ili devus labori?

IS: Nuntempe laboras aktive tri komisionoj pri Landa Agado - Afrika, Azia kaj Amerika; Eŭropa komisiono ankoraŭ estas dormanta, sed dum mia oficperiodo mi strebos vekigi ĝin :) Taskoj de komisionoj estas kunlabori kun organizoj de sia regiono, informi pri ĉiuj novaĵoj de

TEJO, instigi por partopreni en aktivaĵoj kiujn proponas TEJO aŭ ĝenerale esperanta movado.

TT: Kiel fartas laŭ vi la junulara movado ekstereŭropa? Kie ĝi plej vivas?

IS: Mi nuntempe loĝas ekstereŭrope en Brazilo kaj mi plene estas impresita pri agado en Brazilo. Multaj gejunuloj fervore agas por esperanto, kun bonega nivelo de lingvo, kun dediĉo! Estas interese rimarki kiom da junaj instruistoj de esperanto ĉi tie laboras.

Pri aliaj landoj mi scias ne tiel multe, sed certe menciindaj estas agadoj en Suda Koreio, Vjetnamio kaj Ĉinio - se temas pri Azio, pri Afriko Benino, Burundo. Tio estas kion mi rimarkis ĝis nun, mi pardonpetas se mi iun aktivan landon ne menciis.

IJK 2011 en Ukrainio!

TEJO ĝojas anonci, ke la 67-a Internacia Junulara Kongreso okazos en Ukrainio. Tio estis decidita dum lasta reta estrarkunveno.

Temo proponita por la kongreso estas "Daŭropova evoluo - nova koncepto por homaro". La aranĝo okazos julie 2011 proksime de Kievo, ĉefurbo de Ukrainio. La organizan teamon kreas UkrEA (Ukrainia Esperanto-Asocio) kaj ULEJ (Ukrainia Ligo de Esperantista Junularo). Tio estos la unua IJK en Ukrainio. La kongresejo troviĝas proksime de la Kieva akva rezervejo.



Sergeo TYRIN

Kasisto, kasisto@tejo.org



TEJO-Tutmonde:

Saluton Sergio, vi estas en la TEJO-estraro la kasisto. Ĉu vi okupiĝas nur pri burokrataĵoj? Kion konkrete vi faras?

Sergeo TYRIN: Saluton! Mia laboro efektive tuŝas plurajn flankojn ene de TEJO. La kasisto ne nur superrigardas la financojn de la organizo, sed ankaŭ skizas la jaran buĝeton, aprobas aŭ malaprobas elspezojn, tenas kontaktojn kun eksteraj instancoj, helpas kaj revizias la laboron de kasisto de la IJK kaj tiel plu; la administrado de la financoj de TEJO do havas plurajn aspektojn. Grandan parton de mia tempo ja forrabas la burokrataĵoj (kolekto/preparo de dokumentoj): kaj ĉar tio estas bezonata por taŭga prezento de raportoj eksteraj kaj internaj, kaj ĉar organiziteco multege helpas ne havi migrenojn kiam alproksimiĝas limdatoj.

Mi havas konstantan kontakton kun oficistoj en la CO de UEA/TEJO pro diversaj bezonitaĵoj, ĉu rekte (unu telefonvoko povas malnecesigi longegan retpoŝtan interskribon!), ĉu helpe de la TEJO-volontulo, kiu fizike troviĝas tie – tiu ĉi fakto igas la haveblecon de volontulo por TEJO en la CO aparte grava kaj eĉ vivtena por la organizo. Ĉi kontakto estas tiom ofta interalie pro tio ke la financoj de TEJO estas integritaj kun tiuj de UEA: la efektivan librotenanon (tre tedan kaj malamuzan laboron) faras la financo-fako

de UEA.

Ankaŭ nemalmultan kontakton mi havas kun la LKK de IJK, precipe pri la mona flanko de organizado de la kongreso (kion fari, finfine la mono estas la vehiklo per kiu oni povas atingi pli aŭ malpli...). Depende de la sperteco de la IJK-kasisto, tio ŝarĝigas min tre aŭ nur maltre. Tamen, la pli serioza laboro okazas ĝuste post la kongreso, kiam la kompatindaj financprizorgantoj estas jam elĉerpitaj kaj apenaŭ havas emon pensi pri IJK – sed estas necese prepari finkalkulon de la enspezoj kaj la elspezoj...

Signifan tempon kaj atenton mi dediĉas al la administraj subvencipetoj ĉe Eŭropaj instancoj. Ne estas sekreto ke la membrokotizoj ne sufiĉas por kovri ĉiujn elspezojn de TEJO – aparte “pezas” eldonado de TEJO-Tutmonde/Pasporta Servo kaj repago de vojaĝkostoj de aktivuloj – kaj ili ofte multe superas la kontribuon de niaj membroj. Tial gravas havigi eksteran monan subtenon: nuntempe TEJO uzas ĉefe du fontojn por tio, la Eŭropan Komisionon (programo “Youth in Action”) kaj la Konsilion de Eŭropo (“Eŭropa Junulara Fondaĵo”), kiuj provizas al ni la rimedojn kovri la koston de konstanta administrado kaj resti en balancigita stato. La subvencipetoj kaj la postaj raportoj devas esti zorge preparitaj por pruvi ke TEJO estas inda je subteno, sekve la volontulo kune kun ĜenSek ankaŭ estas profunde envolvitaj: krom buĝeto kaj fakturoj tiuj ĉi pakajegoj (la lasta pezis 1.4 kg!) enhavu detalan jaran agad-programon kiu kongruu kun la

prioritatoj de la Eŭropaj instancoj. Pluraj E-aranĝoj aŭtomate kongruas pro sia interkultura-internaciema esenco, la demando nur restas, kiel tion taŭge prezenti per vortoj :)

Ĉe tejo.org vi eble rimarkis la Eŭropan flageton kaj bluan mevon – ili montras ke la projekto de “Tutmonda Esperanta Junulara Organizo” efektive ricevas monan subtenon. Tamen, niajn seminariojn kaj aliajn aranĝojn kiuj ne estas parto de kutima administrado de la organizo, ni devas financi per aliaj rimedoj kaj tial nelaste mian tempon okupas preparo de diversaj agado-subvencipetoj.

TT: Al kiu TEJO sendas subvencipeton? Por kiuj celoj? Kiu(j) konkrete ĝin verkas?

ST: Ĉefe ni turnas nin al la samaj du instancoj: EJV havas du kategoriojn (A - por aranĝoj, B - por publikaĵoj, KDoj, retpaĝoj kaj simile), dum “Youth in Action” estas vasta programo kun pluraj subkategorioj pere de kiuj eblas trovi subtenon por multaj tipoj de agado, kaj eneŭropa kaj ekstereŭropa. Ekzistas kompreneble ankaŭ aliaj fondaĵoj ĉe kiuj oni povas sukcese subvencipeti kaj kiujn TEJO fojfoje uzas por specialaj projektoj, sed esploro, eltrovo kaj daŭra kontakto kun tiuj postulas seriozan investon de laboro kaj horoj – kio praktike estas efektivegebla nur per persono kiu konstante laborus por TEJO en tiu ĉi kampo...

Subvencipetas TEJO ĉu por siaj propraj seminarioj ĉu por aranĝoj organizataj kunlabore kun aliaj. En la unua kazo temas ĉefe pri aktivulaj trejnadoj sed ankaŭ pri

alispecaj lernigaj junularaj trejnsesioj, kaj tiam mi skizas la buĝeton dum estrarano pri kongresoj/seminarioj preparas prezenton kaj programon de la aranĝo. Aliflanke, TEJO povas roli kiel aldona partnero: vera kunorganizanto aŭ por plenumi la postulojn de peto, provizante partneran kadron (kutime sufiĉas unu internacia organizanto tamen pli ol unu kiam nacia teamo gvidas la aranĝon). Eĉ individuoj – kiuj normale ne rajtas subvencipeti – ekviziinte brilan ideon, havas la eblecon efektivigi ĝin eluzante “vindadon” de TEJO. Tiukaze la formularo estas plenigata kunlabore, kvankam mi lasas la decidan aŭtoritaton pri la enhavo al la alia flanko.

Por ekzempli, ĵus ĉe la lasta limdato estis sendita peto nome de TEJO kaj Skolta Esperanto-Ligo, kiu deziras okazigi seminarion por junaj geskoltoj kvankam ne estas mem junulara organizo – ili verkis la skemon, poste mi reviziis kaj sugestis kiel plibonigi la prezenton kaj havi buĝeton pli realisman. Mi do alvokas ankaŭ niajn landajn sekciojn kiuj ŝatus okazigi internacian festivalon (finfine, ĉiu junulara e-aranĝo estas preteksto por festumado, ĉu ne?), aŭ eventon sur loka nivelo, aŭ bezonas aldonan partneron – skribu kaj mi provos konsili kaj helpi subvencipeti ĉe EJV/Youth.

TT: Ĉu foje okazis ke oni rifuzis subvencion al TEJO? Kial? Kiel oni povus solvi tion?

ST: Jes, certe okazis: subvencipeti ne estas afero profana kaj necesas tempo spertiĝi pri la atendataj stilo kaj formo. Diletante

verkita peto (ĉu pro la programo ĉu pro la planataj elspezoj) havigas al si multe malpliigitajn ŝancojn esti akceptita, sekve nepreterlaseblan rolon ludas la scipovo taŭge prezenti sian aranĝon pruvante kiamaniere ĝi kongruas kun la prioritatoj de la koncerna fondaĵo. tial lingvolerteco estas esenca por sukcesi. Cetere, ĝuste tio estas la kialo ke en la alvoko volontuli por TEJO aperas “bona rego de la angla lingvo” – ni estis kritikataj kelkfoje pro tiu ĉi kriterio, sed temas pri vivbezono... kutime mi zorgas ke aldone la peto-tekston provlegu denaska parolanto de angla aŭ almenaŭ persono kies angla-uzo estas ĉiutaga.

Se nia peto estas rifuzita, okazas plej ofte

pro fuŝa vortumo, do tro svagaj celoj aŭ programo de la aranĝo; ekzemple oni proponis interesan koncepton de lingvolerna seminario, tamen por lingvokursoj oni ne rajtas subvencipeti – kaj sekve ni provis prezenti la kulturan-interŝanĝan aspekton. Evidente, la prijuĝantoj ne komprenis “kion ni volas”... ankaŭ malbone planita buĝeto povas esti kulpa: tial prepariĝante sinturni al mon-dona instanco necesas demandi sin ĉu la elspezoj estas realismaj kaj retroigitaj. Kontraŭbatali la iagradan amatorecon povus asisti okazigo de klerigaj trejnadoj, malgraŭ ke ili donos nur limigitan efikon kaj la plej bona maniero estus simple verki peton mem ekhavante realan sperton.

Łukasz ŻEBROWSKI

Estrarano pri Kongresoj, Seminarioj kaj Aktivula Trejnado, lukiz@tejo.org



TEJO-Tutmonde: Saluton Łukasz, en TEJO-estraro vi estas Vicprezidanto kaj estrarano pri Kongresoj, Seminarioj kaj Aktivula Trejnado.

Pri kio temas konkrete via tasko? Ĉu vi nur kunordigas aŭ ankaŭ instigas teamon/komisionon?

Łukasz ŻEBROWSKI: Miaj taskoj en la estraro estas samtempe kunordigaj kaj instigaj. Ideoj pri seminarioj kaj aktivulaj trejnadoj venas de diversaj flankoj. Kelkfoje temas pri Landaj Sekcioj, kiel ekzemple IEJ organizinta seminarion dum la lasta Itala Kongreso. Aliffoje propono pri

seminario venas simple de iu el TEJO-membroj - tiel estas ekzemple pri nun preparata subvencipeto pri lingva seminario.

Proponojn pri la trejnadoj liveras ankaŭ komitato. Krome ankaŭ mi preparas seminario-ideojn kaj tio estas tiu pli instiga parto de mia laboro. Nuntempe mi estas konceptanta aktivulan trejnadon kun la temo "instigi kreemon", kiu okazos komence de julio en Slovakio (kadre de Somera Esperanto-Studado).

Rilate al IJK mia laboro estas ĉefe instiga en periodo, kiam kandidatoj por organizi IJK-n estas serĉataj. Post la elekto aldoniĝas al tio kunordigado de laboro inter LKK kaj TEJO (do estraranoj kaj komisiitoj). Gravus ankaŭ transdono de spertoj al LKK, kiu ja por la unua fojo organizas tian kongreson.

TT: La venonta IJK okazos ĉi somere en Kubo. Kiel, laŭ vi, TEJO aplikas la koncepton pri politika neŭtraleco? Aŭ kiel TEJO devus apliki ĝin?

ĽŽ: En specifa kazo de Kubo ni klopodas laŭeble tute ne tuŝi politikajn temojn. Ne estas rolo de TEJO lukti kun diversaj politikaj sistemoj en la mondo. La IJK-n al Kubo invitis junulara sekcio de Kuba Esperanto-Asocio kaj do kun ili ni kunlaboras por organizi bonegan kongreson. Ĝia temo rilatos al proksimiĝo de kulturoj.

TT: Kiuj estas la ĉefaj problemoj dum organizado de kongresoj, seminarioj aŭ aktivulaj trejnadaj?

ĽŽ: Ĉefa problemoj de IJK-organizado estas manko de geografia diverseco en lastaj jaroj. Junulara kongreso ankoraŭ neniam okazis en Afriko. Pri serĉado de tia ebleco okupiĝas aparta komisiono sub gvido de estrarano pri landa agado.

Iom pli mirinda estas, ke la lasta IJK en okcidenta Eŭropo okazis nur en 2001 en Francio. Tio estas tre malmulte kompare kun kvar kongresoj en meza Eŭropo (2005, 2006, 2008, 2009) kaj du en orienta (2004 kaj okazonta 2011). En lastaj jaroj ofte aperas interesiĝo flanke de okcidenteŭropaj organizoj, tamen por definitiva kandidatiĝo ĉiam io mankas (ekzemple taŭga ejo en akcepteblaj prezoj kaj kondiĉoj). Ni plu kunlaboras kun tiuj organizaĵoj kaj esperas, ke en plej baldaŭaj jaroj eblos organizi kongreson ankaŭ en okcidenta Eŭropo.

Problemoj de seminarioj estas tute aliaj.

Nuntempe fariĝis tre malfacile ricevi subvenciojn por seminarioj el diversaj monfontoj. Subvencipetoj, kiuj senprobleme estus akceptitaj ankoraŭ antaŭ kelkaj jaroj, nuntempe estas bedaŭrinde rifuzataj pro grandega konkurenco ĉe tiuj fondusoj. Ni daŭre provas akiri tiajn subvenciojn, sed por ke tiu problemoj ne povu malebligi al ni aktivulan trejnadon, ni klopodas pli multajn seminariojn organizi kune kun aliaj E-aranĝoj. Tiu formo permesas organizi trejnadon ne tiom multkoste, do ebligas financadon el propraj fontoj.

TT: Ĉu TEJO planas seminariojn aŭ aktivulajn trejnadojn ankaŭ ekster Eŭropo?

ĽŽ: Jes. Uzante okazon, ke UK kaj IJK okazos en Kubo, ni kunlaboras kun ILEI kaj Amerika Komisiono de UEA pri seminario okazonta samlande, dum semajno antaŭ UK. Ĝi celas personojn kiuj jam relative altnivele scipovas Esperanton kaj kiuj interesiĝas ĉefe pri Esperanto-instruado, pri interkultura edukado kaj lernado per Esperanto. Valoras mencii ankaŭ, ke por tiu ĉi seminario (kaj ankaŭ por UK kaj IJK) estis atribuita ĉirkaŭ dudeko da stipendioj por esperantistoj el latinameriko. La stipendiojn financis UEA, ILEI, TEJO, Fondaĵo Mondo kaj privataj sponsoroj.

TT: Kun kiuj aliaj E-organizoj vi kunlaboras/os?

ĽŽ: Se temas pri mia kampo, tiam menciidas ĉefe organizoj kun kiuj ni

organizos kongresojn kaj seminariojn. Kadre de IJK estas menciita jam junulara sekcio de KEA en 2010 kaj en 2011 - UkrEA (Ukrainia Esperanto-Asocio) kaj ULEJ (Ukrainia Ligo de Esperantista Junularo).

Pri trejnadoj, krom ĵus preparolita seminario kun ILEI kaj UEA, ni kunlaboros interalie kun E@I kaj SKEJ (seminario dum SES), IEJ (seminario dum Itala Kongreso), PEJ kaj GEJ (por venonta Junulara E-Semajno).

TT: En 2011 la IJK okazos en la ĉefurbo de Ukrainio, nome Kievo/Kijivo. Kiuj estas la avantaĝoj de ĝi kompare kun la aliaj? Ĉu tiu IJK okazos kunlabore kun alilandaj E-organizoj? La temo tiam estos "Daŭropova evoluo - nova koncepto por homaro", kiel konkrete oni diskutos pri ĝi? Ĉu per aparta seminario kun E-prelegantoj?

ŁŻ: La organizan teamon kreos UkrEA kaj ULEJ, tamen certe estos invitataj ankaŭ eksterlandaj spertuloj. Por konkretigi formojn de diskuto pri la temo estas ankoraŭ certe tro frue. Organizado de IJK 2011 ja nur komenciĝis, do nuntempe estas traktataj temoj pli bazaj ol la programo. Kaj avantaĝoj de Ukrainio, kiel IJK-gastiganto estas aparte multaj. Ĝi tre taŭgas laŭ atingebleco. Al Kievo eblas facile alveni trajne kaj aviadile el multaj direktoj. Vizon por iri tien bezonas nek rusoj, nek okcidenteŭropanoj. La lando estas relative malmultekosta, kio ebligas doni aparte favorajn prezojn. Menciindas ankaŭ, ke en Ukrainio ankoraŭ neniam okazis IJK kaj ke ULEJ, antaŭ unu jaro estis reaktivigita post kelkajara "dormado". Do organizado de tia aranĝo donos al ukrainaj gejunuloj aparte fortan impulson por aktivigi en Esperanto-movado.

Brazila Ministerio pri Edukado kaj Esperanto Unujara agado de BEJO plialtigas je pli ol 200 la nombrojn de E-verkoj en oficiala retejo de Brazilo

de Fernando Maia Jr., Kasisto de BEJO (2009-2010)

fmaiajr@gmail.com

Ekde 2004 la Ministerio pri Edukado de Brazilo tenas la portalon Domínio Público (<http://www.dominiopublico.gov.br>). Ĝia nomo signifas "Publika Havaĵo" aŭ "Publika Posedo" kaj ĝi funkcias kiel biblioteko, kiu gardas plurtipajn materialojn libere uzeblaj. Tie oni trovas verkojn de artistoj, kiuj forpasis antaŭ pli ol 70 jaroj, materialojn produktitajn de universitatoj kaj registaroj permesintaj liberan uzadon, verkojn de aŭtoroj, kiuj registris ilin sub specialaj permesiloj (kiel

Creative Commons) ktp. Tamen antaŭ pli ol unu jaro oni apenaŭ trovis E-materialojn tie, ĉar la retejo, kvankam havanta la lingvetikedon Esperanto, havis malpli ol 10 E-verkojn. Tial la Brazila Esperantista Junulara Organizo (BEJO), landa sekcio de TEJO, ekigis agadon por enirigi tien pli da E-materialoj.

En marto 2009 oni ekkontaktis la Ministerion por koni la respondeculojn pri la portalo kaj la manieron enirigi verkojn.



La kontaktado daŭris preskaŭ unu monaton, ĉar necesas esti akorda kun kelkaj reguloj, inkluzive pri la registro de fontoj (t.e. el kie venas la verkoj) kaj ties respondeculoj (de kiuj oni devas akiri skriban permeson). Ĝenerale tamen la kontakto okazis senbare kaj kun bona volo.

Trafe BEJO elektis kiel ekon la materialon preparitan de Franko Luin sub la kolekto InKo (<http://www.omnibus.se/cgi-bin/inkoListo.pl>). Ekde la forpaso de Luin, lia laboro (205 E-libroj) iom disiĝis tra la Interreto, ĉar lia familio ne povis teni la retejon, kie li gardadis la dosierojn. Nun BEJO sukcesis enirigi en oficialan retejon parton de tiu materialo, danke al la ĝentileco de lia filo, Janko Luin, kiu afable permesis tion. Bedaŭrinde tamen ne ĉiuj dosieroj prilaboritaj de Luin kaj liaj kunlaborantoj rajtas eniri la portalon Domínio Público, ĉar ili ne estas en

publika posedo, kiel ekz-e la traduko de La Eta Princo (ĉar la originala verko mem ne estas libera). Sed nuntempe ĉio, kion eblis enirigi, jam estas disponebla en la retejo, sekure gardita.

Post tiu unua paŝo, BEJO enirigis la verkojn, kiujn disponigis Projekto Gutenberg. Intertempe aliaj agoj estis kontaktitaj, kiel tiu de The Crud Factory (<http://home.comcast.net/~crudfactory/cf3/index.html>) kaj Literaturo.net (<http://www.literaturo.net>), tiu lasta de Tim Westover. Tio rezultis, ke en unu jaro (ĉar ni jam atingis marton 2010) la Esperanto-kolekto en la portalo Domínio Público kreskis al la nombro de pli ol 200 E-verkoj.

BEJO mem preparis dosierojn por enirigi en la portalon, principe la unuajn poemojn en Esperanto. Nuna klopodo provas trovi manieron enkonduki ankaŭ la laboron de Don Harlow tien. Lia familio estas kontaktata.

Ni konsideras fruktodona tiun agadon. Pluraj portugallingvanoj uzas tiun retejon kaj estos bone al ni ĉiuj, ke oni rimarku la kreskantan nombron da verkoj en Esperanto. Krome tiu agado ĉe la Ministerio pri Edukado povos helpi la leĝprojekton, kiu ĵus estis aprobita de la brazila Senato pri la oficialigo de la ebleco instrui Esperanton en la brazilaj mezlernejoj (tiu leĝprojekto nuntempe estas traktata de la Deputita Ĉambro). Fine, restas demando: ĉu en via lando estas simila oficiala retejo? Se jes, kial ne provi sammaniere malfermi spacon por Esperanto tie? Bonan laboron!

Esperanto-futbalteamo en Afriko

de Jérémie SABIYUMVA

Ĵus finiĝis futbala turneo por junuloj je kiu la esperanta futbala teamo ESPERANTO FC partoprenis. En la turneo partoprenis dek tri teamoj, inter ili estis la respublika prezidenta teamo. ESPERANTO FC fondiĝis en 2006 dum la unua nacia kongreso de Esperanto en Burundo je kiu okazis interesa futbala matĉo inter lokanoj (la kongreso okazis en Rumonge) kaj partoprenintoj el nekongresa urbo. Ekde tiam, la teamo regule partoprenadis en diversaj organizitaj regionaj matĉoj. La futbala klubo ESPERANTO FC eĉ invitis lerneajn futbalajn klubojn por ludi kun ili dum la lerneaj sportaj periodoj kaj tiam oni profitas la okazon informi lernejanon pri Esperanto. La ĉefa celo de ESPERANTO FC ne estas gajni matĉojn sed informadi per sporto, en sportaj medioj. Certe, la rezulto estas bona, nun en Rumonge kie estas la teamo ĉiuj futbalamantoj scias kio estas

ESPERANTO. En ĉiu mezgrada lernejo estas funkcia esperanto-klubo kaj je tio ankaŭ la teamo kontribuis.

Dum la lasta matĉo de la ĵus finiĝinta turniro, lokaj esperantistoj multnombre ĉeestis, kaj profitis informadi pri Esperanto kaj eĉ instrui al interesiĝintoj kelkajn esprimojn, kiel salutadon, vortojn rilatantajn al futbalo... Laŭ la Prezidanto de la teamo S-ro Justin NTAKIRUTIMANA, tre facilas informadi per sporto ĉar sporto kunigas multajn personojn. En la venontaj turniroj, la estraro de la teamo kunlabore la nacian asocion organizos esperantokurson ĉe la grundo dum la paŭzo kaj post ĉiuj matĉoj de ESPERANTO FC. Dum la matĉo, anoj de ESPERANTO FC uzas esperanton por montri al publiko ke esperanto estas vivanta lingvo. Porinforme, ESPERANTO FC estas sub respondeco de JEBUO (Junulara Esperantista Burunda Organizo)

kaj ĝi vivas per subteno grandparte de MELS (Monda Esperantista Ligo por Sporto) kaj de aliaj subtenantoj el diversaj mondpartoj. JEBUO planas starigi pliajn porsportajn teamojn por disvastigi Esperanton ne nur en futbalamantoj sed en ĉiuj sportemuloj.

ESPERANTO FC okupas la kvinan lokon en la turniro kaj la unuan en informado.





fotokonkurso

Esperantaĵoj de PEJ

**kun ĈEJ
kaj TEJO**

Pola Esperanto-Junularo | www.pej.pl | pej@pej.pl



Esperantaĵoj de PEJ kaj...
...plej neordinaraj lokoj
...plej mojosaj situacioj
...plej diversaj anguloj de la mondo
...plej neforgeseblaj momentoj
...plej strangaj kunteksto
...plej famaj vidindaĵoj

Tiajn fotojn ni atendas en la konkurso. Proponojn sendu al foto@pej.pl. Gajnu T-ĉemizojn, malfermilojn kaj famon :)

Konkursaj produktoj:

- T-ĉemizo "Lingva revolucio"
- T-ĉemizo "ijkog"
- T-ĉemizo "Ago-Semajno 2006"
- Botelmalfermilo "Esperanto – Probably the best language in the world"



**Limdato:
15-a de junio 2010**

foto.pej.pl

sub aŭspicioj de:

amaskomunikilaj patronoj:



ĈEJ
Ĉeĥa Esperanto-Junularo

libera folio
SENDEPENDA NOVARA BULLENO

Mojose

Novaj por moderna, junstila generacio.

Esperanto.com beta
virtuala komunumo

tejo **tejo**
tutmonde
tutmonda esperantista junulara organo

Varsovia Vento Elsendoj
podkasto.net **per radio formo de podkasto**